
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**



Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 03/02/2022 Kvincentsesdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko* *Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu Google Translate kiel vortaron**


**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .

## Entute 776,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **199,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **177,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*



la esperanta retradio donas bonan ĉirkaŭ-5- minutan aŭskultadon/legadon ĉiun tagon.



PLI DA TRINKMONO ĈE KONTANTA PAGO | ESPERANTA RETRADIO 31a Jan 2022

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



## EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). Numero 1 de "Por progresantoj".

**GRAMATIKAJ GVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1). Menciu la specojn de la eblaj partoj de Esperanta frazo (= propozicio).

2). Kiuj el tiuj specoj estas necesaj?

3). Kia vorto estas normale la kernvorto de ĉiu el la frazpartoj?

4). Kiujn du funkciojn havas la infinitivo?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. numero 568. .

*Marcel Leereveld.*

The Plane That Will Change Travel Forever - YouTube

Nova pasaĝeraviadilo




Falsflaga operacio estas ago farita kun la intenco kaŝi la veran fonton de ago kaj kulpigi alian partion. Ofte uzata por pravigi la komencon de militoj al la popolo. Pirataj ŝipoj uzis falsajn flagojn por alproksimi siajn viktimojn. *Roger Springer*

# Preĝo de nigrulo

Vi kial nigrigis min, Sinjoro…….Vi kial nigrigis min?
Vi kial igis min tia, ke mi malplaĉu al la mondo?
Nigra estas la koloro de malpuraj vestoj, de fulgaj manoj kaj piedoj…
Nigra estas la koloro de mallumo, de lace surtrotitaj stratoj…
Vi kial donis al mi dikajn lipojn, larĝan nazon kaj krispigitajn harojn?
Vi kial kreis iun, kiu ricevas malamajn rigardojn?Nigra estas la koloro de kontuzita okulo, kiam iu estas vundita…
Nigra estas la koloro de l' mallumo, nigra estas la koloro de malpuraĵo.
Kial miaj ostoj estas tiom dikaj, miaj koksoj kaj Zigomoj tiom altaj?
Kial miaj okuloj estas brunaj, kial ne la koloro de la ĉielo?
Kial oni supozas, ke mi estas sentaŭgulo? Kial mi sentas min uzata?
Kial oni vidas mian haŭton pensante ke mi devas esti mistraktata?
Sinjoro, mi nur ne komprenas……Kio malbonas pri mia haŭto?
Kial iuj homoj malamas min ne konante la internan personon?
Nigra estas tio, kion oni "etikedas" min, dezirante ke mi restu izolita……
Nigra estas la koloro de la ombroj…..nigra estas la fino de tago.
Sinjoro, Vi scias ke eĉ mia propra popolo mistraktas min, kaj Vi scias, ke tio ne estas justa.
Oni ne ŝatas miajn harojn, oni ne ŝatas mian haŭton. Oni diras, ke mi estas malhela aŭ tro hela!
Sinjoro, ĉu Vi ne sentas, ke jam estas tempo fari ŝanĝon?
Vi kial ne refaros Vian kreaĵon? Vi kial ne faras ĉiun same?

**La respondo de Dio**


Mi kial faris vin nigra? Mi kial faris vin nigra?
Mi faris vin laŭ la koloro de karbo el kio belegaj diamantoj estas kreataj…….
Mi faris vin laŭ la koloro de oleo, la nigra oro, kiu varmigas homojn.
Via koloro estas la sama kiel tiu de la riĉa malhela grundo, kiu kreskigas la nutraĵon, kiun vi bezonas…
Via koloro estas la sama kiel tiu de la nigra virĉevalo kaj pantero. Ho, ili ja belegas!
Ĉiuj koloroj de la ĉiela ĉielarko troviĝas en ĉiu nacio……
Kiam ĉiuj tiuj koloroj estas miksitaj, vi estas Mia plej bela kreaĵo!
Mi estas la paŝtisto gardanta ilin, ĉiame Mi protektas vin!
Via estas la koloro de la noktomeza ĉielo, Mi metis stelscintilaĵon en viajn okulojn….
Malantaŭ viaj doloroj troviĝas belega rideto…ĝuste tial viaj Zigomoj altas!
Vi estas la koloro de malhelaj nuboj de la uraganoj, kiujn mi kreas en Septembro…..
Mi kreis viajn lipojn dikaj, por ke, kiam vi kisas…oni memoru vin!
Via staturo fortas, viaj ostoj dikas, tio helpas vin kontraŭstari la ŝarĝojn de la tempo……..
La speguliĝaĵo, kiun vi vidas rerigardanta al vi, en la spegulo, estas MIA!!!!!
Vi do stariĝu de sur viaj genuoj, rigardu en la spegulon kaj diru al MI, kiun vi vidas. Mi ne faris vin laŭ la bildo de mallumo…
Mi faris vin laŭ Mia propra bildo!!!!!!!!!!! *Bob Felby*



Baldaŭ aŭstralianoj voĉdonos por decidi kiuj kontrolas la novan parlamenton.
Ĉu vi remarkas ke neniu partio subtenas pacon?
Ĉu milito aŭ paco ne estas la plej granda decido por la popolo?
Ĉu la problemo estas ke militi aŭ ne, ne estas decido de Aŭstralianoj sed de Britujo aŭ Usono?
Nur la *Green* partio subtenas pacon sed ne kiel grandan celon. Kial?? *Roger Springer*

Nur la venkantoj skribas pri la glora historio de milito.  *Roger Springer*

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*





# Ĉu la ĵurnaloj trompas nin ?

## EVIDENTE.

Kio en Melburno okazis pri la batalo kontraŭ la virusoj dum la ĵusaj pluraj monatoj formas la jenajn periodojn. Antaŭ kelkaj monatoj la registaro de Viktorio aplikis sufiĉe da moviĝlimigoj por sukcese sed malrapide elradikigi la virusojn en Viktorio. Por plirapidigi kaj plicertigi tiun preskaŭ totalan elradikigon la viktoria registaro anoncis sian intencon enkonduki eĉ pli striktajn moviĝlimigojn, kiajn praktike sed ne oficiale ni spertas nun. Multaj homoj, inkluzive de la ĵurnaloj kaj de la komercistoj kaj de la federala registaro, ne ŝatis tiujn limigojn por tute mortigi la virusojn, kaj tial komencis periodon de agado kontraŭ tiuj planitaj limigoj. Ili en multaj kazoj eĉ agadis por kompleta forigo de iuj ajn limigoj. Ili, inkluzive de la federala registaro kaj de la ĵurnaloj, komplete bojkotis eĉ mildajn limigojn de la viktoria registaro, kiu fine decidis fari kion postulis la tutlanda registaro, nome akcepti la kunvivadon kun la viruso, kio rezultis en la virusoj fari kion ili volas, ĉar la kontraŭagoj ĉiam venis post la naskiĝo de la novaj virusoj.

La decida agŝanĝo estis, kiam la kunvivemuloj sukcesis igi la viktorian registaron forlasi sian celon elradikigi la virusojn, kaj do akcepti la fatalan kunvivadon kune kun la virusoj. Tiu nova kaj fatala koncepto de kunvivado rezultas en la nunan grandegan nombron da virussuferantoj. Tio estas valora por la riĉegiĝantaj firmaoj kiuj vendas la kontraŭvirusajn injekciojn. Do ili, kaj iliaj amikoj, i.a. la federala registaro, kreas sloganojn kiaj “Ne timu pri la virusoj” kaj “Lasu la virusojn fari sian laboron”, *“Let it rip”.*

Kiam vi legas en la ĵurnaloj artikolojn pri la historio de la ĵusaj pluraj monatoj, vi rimarkas ke tiu artikoloj ne inkluzivas la periodon kiam la kontraŭuloj de kompleta elradikigo de la virusoj en Viktorio sukcesis bojkoti la viktorian registaron, kun la fatala rezulto. Kial la ĵurnaloj silentas pri tiu periodo? Ĉu ili hontas pri sia tiutempa bojkotado de la nura maniero por kontraŭbatali la regnon de la virusoj? Kontraŭe al la inteligentaj decidoj de antaŭaj generacioj, kiuj zorgis ke ne plu ekzistas unu sola kazo de la pesto kaj la aliaj kreskemaj malsanoj ie ajn en Eŭropo kaj en Aŭstralio. Ili inteligente rifuzis diri “Ni vivu kun la pesto”. Kelkaj sciencistoj proponas nun ŝanĝi el de “Ni vivu kun la virusoj” al kompleta elradikigo, sed nun tio estas tro malfrue kaj ne plu sukcesos. Danke parte al la bojkotado de la ĵurnaloj. Ni lasas malbonegan mondon al niaj postvenantuloj! *Marcel Leereveld.*

# Anthony Gaskell




Karaj,
La 30an de januaro (antaŭ 9 jaroj) forpasis Anthony Gaskell el Manlio. Ĉu vi ankoraŭ memoras lin, ekzemple kiam li skermis dum somerkursaro? Kaj ĉu vi memoras, ke li rolis en televidreklamo por la magazeno Woolworths, vidu

https://www.youtube.com/watch?v=9Hu7Y7J3PNY



Amike, *Nicole Else*

Vi scias, ke vi estas trompita kiam via registaro finas longan kaj multekostan militon kaj tiam la milita buĝeto pliiĝas.

**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 31a de januaro 2022 estas diversaj homaj rajtoj kaj edukado. *Franciska Toubale*



Kiam la riĉuloj ludas kiel Dion, la malriĉuloj mortas. *Roger Springer*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



1). 1) Subjekto. 2) Predikato. 3) Objekto. 4) Adjektoj.
2). La Subjekto kaj la Predikato.
3). 1) Substantivo en la Subjekto; 2) Verbo en la Predikato; 3). Substantivo en la Objekto; kaj 4). Adverbo aŭ Prepozitivo en la Adjekto.
4). AŬ kiel Verbo ("Ni devos retroiri") AŬ kiel Substantivo ("Ni deziras retroiri").

*Marcel Leereveld.*